Protokolo de la komitatkunsido en Halluin, la 14an de Aprilo 2013

Arlette Plutniak, prezidantino de la Norda Federacio klarigas ke pro la UK en Lille, ŝajnas al ŝi ke estus tre oportune ke Michel Dechy estu la nova prezidanto de la federacio. Michel akceptas kandidatiĝi kaj ĉiuj komitatanoj unuanime elektas lin.

Edmond Plutniak proponas ke Jean Dietrich estu nomumita Honora Prezidanto ĉar de pli ol 62 jaroj, sen laciĝi, li mirinde laboras por nia movado. La propono estas unuanime akceptita.

Sekvas decidoj pri la aliaj estraranoj: France Valet (vicprezidantino), Xavier Vilain (kasisto) kaj Katja Boen (sekretariino) estas unuanime elektitaj.

Xavier Vilain proponas ke ankaŭ Cyrille Decouture estu nomumita vicprezidanto por firmigi la ligojn de la amienanoj kun la federacio. Cyrille akceptas, sed Catherine Leveque atentigas nin pri la nuntempaj problemoj sine de Espéranto-80. Ŝi klarigas ke ŝi mem ne plu membriĝas en la klubo, kaj estas individua membro de la federacio.

Redaktis Katja Boen, sekretariino de la Norda Federacio